

### Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperantokurse** für: a) Anfänger ohne Vorkenntnisse: Di. 19:30-21:00 Uhr, Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen (Infoveranstaltung dort am **05.09.2006** um 19:30 Uhr); b) Anfänger mit Vorkenntnissen: Do. 19:30-21:00 Uhr, Ort: wie a); c) Fortgeschrittene: Do. 19:45-21:15 Uhr, Evangelisch-lutherische Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Unsere **monatlichen Vereinstreffen** finden statt am **13.09.2006** in der Gaststätte *Weserlust*, Kaje 1, 26919 Brake; am **18.10.2006** im Hotel *StadtHotel Oldenburg*, Hauptstr. 36-40, 26122 Oldenburg (je 19:30 Uhr). Wir werden unseren Verein auch beim diesjährigen Festumzug des **Rodenkircher Marktes** (am **23.09.2006**) präsentieren. Unsere **Weihnachtsfeier** ist am **17.11.2006** um 19:30 Uhr in der Gaststätte *Panthera Rodizio*, Willy-Brandt-Platz 1-3 (Passage Bürgerweide), 28215 Bremen. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite

<http://www.esperanto.de/unterweser/arangoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

04.-07.10.2006

Esperanto-Sprachkurs (drei Niveaus), ICH<sup>\*)</sup>

08.10.2006

3-a *Rata Rendevuo* der Esperanto-Gruppe Hameln, Bad Pyrmont

28.-29.10.2006

Jubiläumsfeier der Esperanto-Gruppe Bremen in der Jugendherberge Bremen, Kalkstr. 6, 28195 Bremen

01.-03.12.2006

Esperanto-Sprachkurs (drei Niveaus), ICH<sup>\*)</sup>

<sup>\*)</sup>ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

**Ĝojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!**  
**Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!**

### Impressum:

Zeitschrift:

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)

Erscheinungsweise:

dreimal jährlich als Druckausgabe und elektronische Ausgabe, Netzseite:

<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Herausgeber:

Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion:

Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,  
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837  
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368  
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044  
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Raiffeisenbank Oldenburg eG  
BLZ 28060228  
Kontonummer 1200160000  
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

**E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.**

# Esperanto Gazeto

N-ro 17

ISSN 1861-3330

Okt. 2006 – Jan. 2007

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



En la antikvosalono de la Allmers-domo en Rechtenfleth  
Im Antikensaal des Allmers-Hauses in Rechtenfleth

Piedpilka mondĉampiono kaj en 2006 gastiga lando de la Universala Kongreso de Esperanto: **Italio**. Kaj iomete da ĝi estas eĉ en Rechtenfleth...

Fußballweltmeister und 2006 Gastgeberland des Esperanto-Weltkongresses: **Italien**. Und ein bisschen davon gibt es sogar in Rechtenfleth...

## Esperanto-Grupo de Bremeno vizite en Rechtenfleth la 17-an de Junio 2006

La inviton de la Esperanto-Grupo de Bremeno je ekskurso al Rechtenfleth sekvis preskaŭ dudek personoj. El ili estis ne nur niaj Bremenaj geamikoj, sed ankaŭ ses membroj de nia klubo: Anne, Anke, Günther, Dörte, Gisela kaj mi. Mi loĝas nur kelkajn paŝojn distance de la unua alirloko: la Allmers-domo. Ĝi iam apartenis al Hermann Allmers (\* en la 11-a de Februaro 1821; † en la 9-a de Marto 1902), verkisto, amiko kaj akcelanto de la belaj artoj. El lia plumo estas interalie la *Marschenbuch* ("libro pri fekundaj malaltaĵoj"), *Römische Schlendertage* ("Romaj tagoj de sencela promenado", literatura skizolibro) kaj *Feldeinsamkeit* ("kampara soleco", poemo). Ekde 1860, sub la influo de sia 15-monatdaŭra estado en Italio, li igis novformi la ĝardenon kaj partojn de la domo, tiel ke estiĝis muzeo aŭ, pli bone: kultura kaj historia kleriĝloko. Ekzemple la lumtrafluata *Antikensaal* ("antikvosalono") estas ekspoziciejo de pentraĵoj de Arthur Fitger kaj kopi-verŝaĵoj de antikvaj romiaj skulptaĵoj. Kia bela en-etosigo je la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco! Super la *Antikensaal* troviĝas la *Marschensaal* ("salono pri fekundaj malaltaĵoj"). Tie de pentraĵoj de interalie Heinrich von Dörnberg estas perata la historio de tiu ĉi nordgermana pejzaĝo, en kiu situas Rechtenfleth. La Allmers-domo nun apartenas al la subdistrikto Cuxhaven kaj estas administrata de Willi Kliebisch. Lia gvidado tra la domo estis tre bona – kaj germanlingva. Nu, mi antaŭzorge estis preparinta Esperantlingvajn informbroŝurojn pri la Allmers-domo, kiujn mi disdonis al la ekskursantoj. Post la vizito de la Allmers-domo sekvis promeno en suna vetero sur kaj laŭlonge de la Vezer-digo. Tie staras la de Allmers en 1899 konstruigita monumento de Karolo la Granda. (Post la trovo de glavo en la ĉirkaŭaĵo, Allmers kredis, ke Karolo la Granda ĉe Rechtenfleth estis krucinta la Vezeron.) De sur la digo mi montris al la aliaj ekskursantoj, kie mi loĝas kaj kie estas la plej bonaj lokoj por boatveturi kaj bani sin en la Vezero. Post la promeno estis bongustaj manĝaĵoj en la gastejo *Weiderhof* de Wolfgang Mensing. La urbanoj el la ekskursantoj pli aŭ malpli konscie estis sekvintaj la vokon de Allmers: "*Kommt, Freunde! Flieht der Stadt Gewühl*" ("Venu, amikoj! Forkuru el la interpuŝiĝo de la urbo") kaj pasigis kune kun la ne-urbanoj denove tre belan tagon en Esperantujo, ĉi-foje en Rechtenfleth. – Andreas

### Esperanto-Gruppe Bremen zu Besuch in Rechtenfleth am 17.06.2006

Der Einladung der Esperanto-Gruppe Bremen zu einem Ausflug nach Rechtenfleth folgten fast zwanzig Personen. Unter ihnen waren nicht nur unsere Bremer Freunde, sondern auch sechs Mitglieder unseres Vereins: Anne, Anke, Günther, Dörte, Gisela und ich. Ich wohne nur ein paar Schritte vom ersten Anlaufpunkt entfernt: dem Allmers-Haus. Es gehörte einst Hermann Allmers (\* 11.02.1821; † 09.03.1902), Schriftsteller, Freund und Förderer der schönen Künste. Aus seiner Feder stammen u. a. das „Marschenbuch“, „Römische Schlendertage“ (ein literarisches Skizzenbuch) und „Feldeinsamkeit“ (ein Gedicht). Von 1860 an ließ er unter dem Einfluss seines 15-monatigen

## Enigma

	1	2	3	17	18	19
1					4	
2				5		
3					7	8
10					20	
11			9			
12		16				

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas "Fundamentan" landnomon.

## Horizontale

**1:** tre alta varmlanda herbospeco [sen finaĵo]; **2:** pensigi pri [kvar literoj, sen finaĵo]; **3:** nokto-papilioj; **4:** aŭtosigno de Gera; **5:** ĥemia simbolo de radiumo; **9:** literatura traktaĵo; **10:** unu el la ostopecoj de la buŝo [sen finaĵo]; **11:** finaĵoj de adjektivo kaj multnombro; **12:** tabelvorto [kun multnombro-finaĵo].

## Vertikale

**1:** angla komiksfiguronomo kun la signifo "vespertviro"; **2:** iuj krom mi; **3:** ĉefurbo de Bavario [sen finaĵo]; **5:** prepozicio uzata por la genitivo; **7:** iniciatinto de Esperanto [mallongigo]; **8:** mallongigo de Eŭropa Esperanto-Unio; **9:** finaĵo de akuzativo; **16:** finaĵo de adverbo; **17:** aŭtosigno de Berlino; **18:** sovaĝa Eŭropa bovo; **19:** tuberoj kreskantaj sur kverkfolioj; **20:** refleksivpronomo.

### Urbofesto en Nordenham en la 18-a de Aŭgusto 2006

Dekope ni prezentis nian klubon dum la urbofesto en Nordenham: Kiel piediranto-grupo kun manĉaro ni partoprenis en la procesio. Kaj kompreneble ne mankis la balailoj. Survoje ni disdonis bombonojn kaj Esperanto-informbroŝurojn. Poste ni kune vespermanĝis ĉe Anne kaj promenis tra la festplaco. – Andreas

### Stadtfest in Nordenham am 18.08.2006

Zu zehnt präsentierten wir unseren Verein beim Stadtfest in Nordenham: Als Fußgruppe mit Handwagen nahmen wir am Umzug teil. Und selbstverständlich fehlten nicht die Besen. Unterwegs verteilten wir Bonbons und Esperanto-Informationsbroschüren. Danach aßen wir gemeinsam zu Abend bei Anne und spazierten über den Festplatz. – Andreas



Nia klubo dum la procesio de la urbofesto de Nordenham / Unser Verein beim Umzug des Nordenhamer Stadtfestes

### Balail-ĵetado kaj krispbrasik-manĝado en preskaŭ 30°C (Rodenkirchen, 25-a de Julio 2006)

Ĉu balail-ĵetado kaj krispbrasik-manĝado meze de somero? Nia festkomitato ebligis tion – eĉ en la formo de internacia Esperanto-aranĝo kvar tagojn antaŭ la komenco de la Universala Kongreso de Esperanto. Dek ok partoprenantoj, disdividite en du teamoj, laŭvice ĵetis balailon kiel eble plej malproksimen. Kia bonŝanco, ke granda parto de la ludvojo estis en la ombro de arbareto! Ĉe la “interludoj” ĉi-foje estis malpli grava la ĵetado, sed pli grava la kaptado. Post la ludoj ni manĝis en la restoracio *Friesenheim* krispbrasikon, kiu tre bongustis ankaŭ en la varmego-ondo. Brasikreĝino Nadja Meškov el Krasnojarsko, Rusio, kaj brasikreĝo Andreas Kück el Rechtenfleth akiris siajn titolojn per tio, ke ili “malplej bone” taksis la nombron da maizgrajnoj en pakaĵo de 500 gramoj. La vespero finiĝis per muziko kaj dancado, kaj ĉiuj tre amuziĝis. Multan dankon al niaj festkomitatanoj Ilona, Anke, Kerstin kaj Hannelore por la sukcesa somerplezuro. – Anne, Dörte, Andreas

### Besenwerfen und Grünkohlessen bei fast 30°C (Rodenkirchen, 25.07.2006)

Besenwerfen und Grünkohlessen mitten im Sommer? Unser Festausschuss machte es möglich – sogar in Form einer internationalen Esperanto-Veranstaltung vier Tage vor dem Beginn des Esperanto-Weltkongresses. Achtzehn Teilnehmer, eingeteilt in zwei Mannschaften, warfen der Reihe nach einen



*Balail-ĵetado en somero / Besenwerfen im Sommer*

Besen so weit wie möglich. Was für ein Glück, dass ein Großteil der Spielstrecke im Schatten eines Wäldchens lag! Bei den „Zwischenspielen“ kam es diesmal weniger aufs Werfen, sondern mehr aufs Fangen an. Nach den Spielen aßen wir im Restaurant *Friesenheim* Grünkohl, der auch in der Hitzewelle sehr gut schmeckte. Kohlkönigin Nadja Meschkow aus Krasnojarsk, Russland, und Kohlkönig Andreas Kück aus Rechtenfleth erwarben sich ihre Titel dadurch, dass sie die Anzahl der Maiskörner in einer 500 g-Packung „am wenigsten gut“ schätzten. Der Abend endete mit Musik und Tanz, und alle amüsierten sich sehr. Vielen Dank an unsere Festausschussmitglieder Ilona, Anke, Kerstin und Hannelore für den gelungenen Sommerspaß. – Anne, Dörte, Andreas

Aufenthaltes in Italien den Garten und Teile des Hauses neu gestalten, sodass ein Museum entstand, oder besser: ein kultureller und historischer Bildungsort. Beispielsweise ist der lichtdurchflutete Antikensaal Ausstellungsraum für Gemälde von Arthur Fitger und Abgüsse antiker römischer Skulpturen. Was für eine schöne Einstimmung auf den Esperanto-Weltkongress in Florenz!

Über dem Antikensaal befindet sich der Marschensaal. Dort wird durch Gemälde von u. a. Heinrich von Dörnberg die Geschichte dieser norddeutschen Landschaft vermittelt, in der Rechtenfleth liegt. Das Allmers-Haus gehört jetzt dem Landkreis Cuxhaven und wird von Willi Kliebisch verwaltet. Seine Führung durch das Haus war sehr gut – und deutschsprachig. Nun, vorsorglich hatte ich Esperanto-sprachige Informationsbroschüren über das Allmers-Haus erstellt, die ich an die Ausflügler austeilte. Nach dem Besuch des Allmers-Hauses folgte ein Spaziergang auf und entlang dem Weserdeich. Dort steht das Karl-der-Große-Denkmal, das Allmers 1899 bauen ließ. (Nach dem Fund eines Schwertes in der Umgebung glaubte er, dass Karl der Große bei Rechtenfleth die Weser überquert hatte.) Von oben auf dem Deich aus zeigte ich den anderen Ausflüglern, wo ich wohne und wo die besten Plätze zum Bootfahren und Baden in der Weser sind. Nach dem Spaziergang gab es leckere Speisen in Wolfgang Mensings Gaststätte *Weiderhof*. Die Städter unter den Ausflüglern waren mehr oder weniger bewusst dem Ruf Allmers': „Kommt, Freunde! Flieht der Stadt Gewühl!“ gefolgt und erlebten zusammen mit den Nicht-Städtern wieder einen sehr schönen Tag im Esperanto-Land, diesmal in Rechtenfleth. – Andreas



*Kie Rechtenfleth aspektas itale: en la ĝardeno de la Allmers-domo / Wo Rechtenfleth italienisch aussieht: im Garten des Allmers-Hauses*

### La 91-a Universala Kongreso de Esperanto (Florenco, 29-a de Julio ĝis 5-a de Aŭgusto 2006)

El la proksimume 2200 partoprenantoj el ĉirkaŭ 60 landoj estis ankaŭ kvin membroj de nia klubo: Kerstin (kiel unuafoja kongresano), Alke, Mario, Hans Gerd kaj mi. Florenco abundas pri arte formitaj konstruaĵoj kaj artaĵoj ĝenerale. Maldetale oni povus diri, ke la tuta urbo estas muzeo tre bela, tre vigla kaj grandega. Nu, mi partoprenis la kongreson ne ĉefe pro artaj aŭ turismaj kialoj, sed pro Esperanto. Sed la *Galleria degli Uffizi*, *Ponte Vecchio*, *Duomo di Santa Maria del Fiore*, la mondfama kliniĝinta turo de Pisa (je 81 km distance de Florenco) kaj aliaj vidindaĵoj certe postlasis ne-forgeseblajn impresojn. La etoso estis bonega. Al tio certe kontribuis la kongresejo. Tiu ĉi konsistis el tri najbaraj

konstruaĵoj proksime al la ĉefstacidomo: *Fortezza da Basso*, *Palazzo dei Congressi* kaj *Palazzo degli Affari*. Inter la du ĉi-lastaj estas ĝardeno, kiu vole-nevole funkciis kiel renkontiĝejo kaj loko por improvizataj muzikado kaj dancado. En la placo ĉe la *Fortezza da Basso* estis ankaŭ publike alirebla festo organizata ne de la kongres-organizantoj. Tie al la kongresanoj do estis bona oportuno amuziĝi kaj aŭdigi Esperanton ene de la ne-esperantistaro surloke, ekzemple dum la improvizita kunveno de skajpanoj (t. e. esperantistoj uzantaj la interret-telefoni-programon *Skype*). Iuj el ili persone renkontiĝis je la unua fojo post multaj ĝis tiam nur interretaj voĉaj aŭ tajpaj interparoloj kaj konferencoj. Sed reen al la "oficiala" kongresprogramo: En la publika kunsido de la Akademio de Esperanto estis atentigite pri aprobota deklaro pri skribmanieroj allaseblaj pro teknikaj kialoj. Krome mi kaptis la okazon por privata interparolo kun Akademi-prezidanto profesoro d-ro Mattos pri laŭ-Fundamente permesataj pozicioj de la litero ŭ. Pri tio mi kvar monatojn antaŭe estis petinta de li oficialan respondon. Lia opinio estis aperinta en lia nepre leginda referato ne-longe antaŭ la kongreso. Pliaj tre bonaj kongres-aranĝoj estis la prezento pri la latina lingvo kadre de la Kleriga Lundo kaj la kunsido de radio-aŭskultantoj. Mi unuafoje "vidis la voĉojn" de la Esperanto-elsendoj de RAI Internacia kaj Radio Vatikana, d-ron Antonio De Salvo resp. Carlo Sarandrea. Tre impresaj estis la prezento de flagsvingistoj en la *Piazza della Signoria* kadre la Nacia Vespero, la teatraĵoj "La duonokulvitro", "La pipamanto" kaj "Mi neniam amos" okaze de la jubileo de la Esperanto-teatro kaj la Internacia Arta Vespero. En ĉi lasta kantis interalie la kuba muzikisto Julián Angulo Hernández ("Juliano") kaj la hispana muzikisto Solo. Tiu ĉi kun ĥoro tre originalece prezentis la Esperanto-himnon laŭ flamenka stilo. La Kongresa Balo estis tre amuza ĉefe pro la "bambumado". Tiu ĉi ordinare estas praktikata dum junularaj Esperanto-aranĝoj: Dum la kanto "La Bamba" estis plurfoje ludata, iuj dancantoj man-en-mane ĉirkaŭiradis centran grupon de aliaj dancantoj. Ĉi lastaj devis "liberigi sin", kisante trifoje iun el la rondo kaj poste elŝanĝante kun ŝi aŭ li la lokon. Unu el niaj klubanoj tre ofte devis liberigi sin. Divenu, kiu. Kia grandioza kongreso en suna itala somero! – Andreas

#### Der 91. Esperanto-Weltkongress (Florenz, 29.07. bis 05.08.2006)

Unter den rund 2200 Teilnehmern aus ca. 60 Ländern waren auch fünf Mitglieder unseres Vereins: Kerstin (als erstmalige Kongressteilnehmerin), Alke, Mario, Hans Gerd und ich. Florenz ist reich an künstlerisch gestalteten Bauten und Kunstwerken überhaupt. Grob könnte man sagen, dass die ganze Stadt ein sehr schönes, sehr lebhaftes und riesiges Museum ist. Nun, ich nahm an dem Kongress nicht hauptsächlich aus künstlerischen oder touristischen Gründen teil, sondern wegen Esperanto. Aber die *Galleria degli Uffizi*, *Ponte Vecchio*, *Duomo di Santa Maria del Fiore*, der weltberühmte schiefe Turm von Pisa (81 km entfernt von Florenz) und andere Sehenswürdigkeiten hinterließen sicherlich unvergessliche Eindrücke. Die Stimmung war hervorragend. Dazu trugen sicher die Kongressörtlichkeiten bei. Diese bestanden aus drei benachbarten Gebäuden in der Nähe des Hauptbahnhofs: *Fortezza da Basso*,

*Palazzo dei Congressi* und *Palazzo degli Affari*. Zwischen den beiden letztgenannten ist ein Garten, der gewollt oder ungewollt als Treffpunkt und Ort für improvisiertes Musizieren und Tanzen fungierte. Auf dem Platz bei der *Fortezza da Basso* gab es auch ein öffentlich zugängliches Fest, das nicht von den Kongress-Organisatoren organisiert wurde. Dort war für die Kongressteilnehmer also eine gute Gelegenheit, sich zu amüsieren und Esperanto innerhalb der Nicht-Esperantisten vor Ort hören zu lassen, z. B. bei der improvisierten Zusammenkunft von Esperantisten, die das Internet-Telefonie-Programm *Skype* benutzen. Manche von ihnen trafen sich zum ersten Mal persönlich nach etlichen bis dahin nur im Netz erfolgten Gesprächen und Konferenzen (mündlich oder schriftlich). Aber zurück zum „offiziellen“ Kongressprogramm: In der öffentlichen Sitzung der Esperanto-

Akademie wurde eine noch zu billigende Erklärung zu Schreibweisen angekündigt, die aus technischen Gründen zulässig sind. Außerdem ergriff ich die Gelegenheit für ein privates Gespräch mit Akademie-Präsident Professor Dr. Mattos über Positionen des Esperanto-Buchstabens „ŭ“, die gemäß dem *Fundamento* (d. i. die Esperanto-Grundlage)



Ponte Vecchio

erlaubt sind. Dazu hatte ich ihn vier Monate zuvor um eine offizielle Antwort gebeten. Seine Meinung war in seinem unbedingt lesenswerten Referat kurz vor dem Kongress erschienen. Weitere sehr gute Kongressveranstaltungen waren die Präsentation zur lateinischen Sprache im Rahmen des Bildungsmontags und die Radiohörer Sitzung. Zum ersten Mal „sah ich die Stimmen“ der Esperanto-Sendungen von RAI International und Radio Vatikan, Dr. Antonio De Salvo bzw. Carlo Sarandrea. Sehr eindrucksvoll waren die Darbietung von Flagenschwingern auf der *Piazza della Signoria* im Rahmen des nationalen Abends, die Theaterstücke „La duonokulvitro“ („Das Monokel“), „La pipamanto“ („Der Pfeifenliebhaber“) und „Mi neniam amos“ („Ich werde niemals lieben“) anlässlich des Jubiläums des Esperanto-Theaters und der internationale Kunstabend. Darin sangen u. a. der kubanische Musiker Julián Angulo Hernández („Juliano“) und der spanische Musiker Solo. Dieser präsentierte mit einem Chor auf sehr originelle Weise die Esperanto-Hymne im Flamenco-Stil. Der Kongressball war hauptsächlich wegen des „bambumado“ sehr amüsant. Dieses wird normalerweise bei Esperanto-Jugendveranstaltungen praktiziert: Während das Lied „La Bamba“ mehrmals gespielt wurde, gingen einige Tanzende Hand in Hand um eine Gruppe anderer, in der Mitte Tanzender herum. Letztere mussten „sich befreien“, indem sie dreimal jemanden aus dem Kreis küssten und mit ihr oder ihm den Platz tauschten. Einer der Vereinsmitglieder musste sich sehr oft befreien. Ratet mal, wer. Was für ein großartiger Kongress in einem sonnigen italienischen Sommer! – Andreas